

ASISTILO



CPPAP n°71486

Hejmoj

Bulteno pri esperantaj komunumoj

Supplément à *Asistilo* n°17, aŭtuno/vintro 1995, n-ro 7 (duobla numero)

Ĝojan, feliĉan, pacan,
amuzan, neĝan, bongustan,
donacoplenan, sanan kaj
ĝenerale bonegan
Kristnaskan ferion,
kaj stimulan, interesan,
sukcesan kaj spiritan
novan jaron, deziras
amike *Erika* kaj *Majk*
[kaj la rezidanto kaj red.]

Pri la pasinta jaro vidu
la 6-duonpaĝan raporton
pri la lasta **Jarkunveno**
en Balagué... , kaj pri la
estonteco ne forgesu re-
aliĝi kaj (re)aboni !

(Fotita de Gilles Gruel :
Balagué, de monta brutejo.)



ANONCENDAS, KE

(ĝis) neceseja persekutemo, bigota pacifismo, blaga plibonsciemo,
memnaza fidelismo, kontraŭhejma sunkaptilismo,
malverarmilitisma senkulpiĝemo, stpensiga forpelemo.

(dom)estra faŝismo, etfaba malpafilemo, mania nukmikslaksismo,
obstina pedelismo, fraŭda neforgesemo kaj
komunikada minimalismo

FINE KAJ SUKCESE ĈESIGIS LA VIVON DE MONDHEJMO (MH)

(Ekologia Centro Internacia kun Esperanto kiel Oficiala Lingvo).

Eblas kondolenci laŭ via persone preferata metodo ĉe:

Akiles SANZ
en Francio: Cauduro/Maison Esperanto, FR-34360 St. Chinian
en Germanio: Fliednerweg 6, DE-14195 Berlin

Antaŭ kelkaj semajnoj
mi ricevis de « *Lupiro* »
(el Ahnatal-Weimar, D)
la ĉi-apudan anonckarton.
Post telefonado al la tri
lastaj **Mondhejmo**-pre-
zidantoj konfirmiĝas ke,
bedaŭrinde, tiu ĉi asocio
baldaŭ **malfondiĝos** (ĉe
la sub-prefektejo de Béziers)
pro rilataj problemegoj,
malgraŭ ĝia principo :

« *En MH regas frateco,
amo kaj racio. Ni ne vo-
las esti ŝajne feliĉaj je la
kosto de aliaj.* »

(Vd. *Hejmoj* n°3 p.5 & 4 p.6)

« Foiro » pri memmastrumado

En Padova de 7 ĝis 10-9-95 ĉe *Casa dei Dritti Sociali* (Domo de Sociaj Rajtoj), okazis «foiro» pri memmastrumado : kvar tagojn por interparoli, starigi rialtojn, interŝanĝi ideojn kaj produktojn. Estis okazo por koni kiu vivas en okupita domo kaj kiu organizas justan kaj solidaran komercon, kiu starigas kamparanan komunumon aŭ liberecanan lernejon, kiu memproduktas librojn kaj diskojn aŭ starigis municipajn bazajn federaciojn.

La Padova « foiro » sekvis tiun kiu okazis en la urbo Aleksandrio en 1994. En Aleksandrio komencis la rektaj interrilatoj necesaj por ebligi solidan reton de interŝanĝoj kaj kunlaborado.

Dum la « foiro » oni traktis la jenajn temojn :

– **Pri praktika memmastrumado.** Ekspozicio de diversaj aĵoj : libroj, vestoj, diskoj, legomoj ktp. , produktitaj kaj cirkuligitaj ekstere de la merkata logiko. Prelegoj kaj debatoj pri kamparanaj komunumoj, lokoj de renkontiĝo, produktado kaj disvastigado de liberecana kulturo, municipaj bazaj organizaĵoj, memmastrumaj servoj. (...)

– **Ŝtataj kaj memmastrumaj servoj.** La komunumo kontraŭ la municipo : la liberecaj municipoj, de la memmastruma projekto de publika servo ĝis konkreta eksperimentado de eksterinstitucia politika agado. Memmastrumado de la rimedoj, memmastrumado de la teritorio. (...)

– **Por memmastruma komunikado.** Problemoj kaj perspektivoj de la baza eldonado en la epoko de la superregado de amasa informado. La utopioj kontraŭ la povo : lokoj kaj formoj de la libereca komunikado.

– **La skatolo de iloj.** Prilaborado de konkreta projekto por disvastigo kaj subteno de memmastrumaj spertoj. Estis prelegoj pri la spertoj en la jenaj komunumoj : *Comunidad do Sur*, Kvartalo de *Croix Rousse* - Lyon [F], *Cristiania* [Kopenhago, DK], *Niederkaufungen*, Komunumo *Urupia* (Brindisi, I), Komunumo kaj organizado de baza municipismo en la urbo Spezzano Albanese (I).

Oni parolis eĉ pri komputilreta monda kunagado pere de *Internet*. Laŭ mi temas pri tre grava novaĵo ĉar tiel ni povos organizi interŝanĝoj de produktoj kaj ideoj en reala tempo, malmultekoste, inter komunumoj en la tuta mondo.

Nur detalo : en kiu lingvo ni skribos kaj parolos ? Mi komencis proponi esperanton : kelkaj kamaradoj interesiĝis pri tio. Kvazaŭ certe okazos alia *foiro* la venontan jaron en alia itala urbo.

Partoprenu, skribu al mi !

Guido Gentile, [adreso sur apuda paĝo]

Pagi per saleroj : la nova mono !

(...) Tio estas strangspeca merkato. Oni povas per ĝi aĉeti kukojn, trovi plumbiston efikan, aŭ tondigisian hararon. Oni povas ankaŭ per ĝi vendi fromaĝojn, skiojn aŭ matematikokursojn. Sed ĉiufoje ne indas montri kreditkarton, monerojn aŭ bankbileton. Ĉi tie oni pagas per ĉekoj nekonataj je kelkaj mejloj.

Montbel, perdita vilaĝeto de Arjeĝo. De septembro 1994, en tiuj ĉepireneaj montetoj senloĝigitaj, funkcias la unua (en Francio) Sistemo por Ekonomio Loka (SEL : france *sel* signifas *salon*).

La ideo venas de iuj malriĉaj areoj de Britio. Tie pli ol 20.000 personoj, ĉefe senlaboruloj, lacaj nenion fari, decidis mem zorgi pri la propra destino. Ili ne havas monon por havigi al si produktaĵojn kiujn ili bezonas. Ili ne havas laborpostenon. Ili elektis labori unu por la aliaj kaj tiel plibonigisian vivon, interŝanĝante havaĵojn kaj servojn.

« *La klopodoj de la Britoj nin pasiigis. Por scii pli pri tio ni iris lastan someron ĉe Semajnon de Alternativaj Ekonomioj en Montpellier. Ni eksciis ke similaj eksperimentoj ekzistis ankaŭ en Kanado, en Aŭstralio. Kaj ni decidis ekpaŝi* », klarigas Claude Fressonnet¹, unu el la fondintoj de la Arieĝa reto : « *La principo simplas. Ankaŭ se vi ne havas monon, senhezite konsumu ! Vi ĉiukaze trovos servojn al iu el la grupo por ekvilibrigi vian konton* ».

RMI-ulo² restaŭras fojnejon en kiu li loĝas kaj vivetas el siaj sociaj mon-atribuoj. Dank'al la reto li povas aĉeti senkemiajn fruktojn kaj legomojn. Bona elektristo, li redone laboretas ie kaj tie. « *Interesajo en la sistemo estas ke oni povas havigi al si iom da superfluaĵo sen risko je ĉebanka malhavo* ».

Françoise, administra funkciulino, trikigis al sensalajrita patrino puloveron por si. Ŝi aĉetis jam uzitan sakon el ledo kaj serĉas matematik-instruadon por sia filo. Ŝi ricevos SEL-erojn per venontsomera partopreno en nigroriba rikoltado. Ŝi certigas : « *Nia tuta ekonomio kuŝas sur konfido* ».

En ses monatoj la reto plivastiĝis ĝis pli ol 200 [nun 300] personoj. Membro[j] de la asocio registras ĉies ofertojn kaj petojn publikigotajn en loka bulteno, aliulo[j] la efektivajn servojn kaj «aĉetojn», kaj tagon post tago kalkulas la kontojn de ĉiuj [per komputilo]. Fakte multobliĝas la interŝanĝoj.

(...) Hodiaŭ, kiam multekostas kredito, kiam multaj (emeritoj, senlaboruloj) senokupas, «*saleroj*» ĝustatempe venas por revigligi la ekonomion. En [nun deko da] departementoj, retoj teksigas laŭ la Arjeĝa modelo. [Eĉ dua reto, ankoraŭ pli loka, ĵus kreiĝis en la ĉirkaŭaĵo de Balagué kun jam pli ol 80 membroj].

A.B.³

1/ Vicprez-ino de *Centro de Esperantaj Studoj de Arieĝo*.

2/ Ricevanto de minimuma vivrimeda mono por ensociiĝo.

3/ Laŭ *L'Express*, trad. de HIK-sekr. en *E-Pyrénées* n-ro 68.

Leteroj

Saluton! Mi estas junulo el Hispanio, 18-jara. Mi amas la naturon kaj ĝian protektadon. Nun mi studas fizikon kaj loĝas ĉe miaj gepatroj.

Mi volas foriri, kaj la fizikon forlasi, dum almenaŭ unu jaro. Mi skribas por informiĝi pri komunumoj en Eŭropo.

Mi estas vegetarano kaj pacisto. Mi amas naturan vivstilon. Mi deziras vivi en internacia etoso kaj labori por pagi mian loĝadon kaj manĝon kaj, se eble, ricevi iomete da mono.

Mi esperas ke vi povos infomi min. Dankon !
Merci beaucoup. **Pedro Pablo Muñoz**
(Ni ne ricevis respondon al nia respondo je 27-6-95.)

Treviso, la 28-an de junio 1995

Kara Christian,

Ĝus mi ricevis la atenditan bultenon de HIK. Tute bone. Mi planas veni al Balagué je la fino de septembro, sed mi reskribos al vi pri tio...

Fratajn salutojn, **Guido Gentile**

Kara Sinjoro,

Mi estas juna Esperantisto pola, kiu tre volas plibonigi sian povran francan lingvoscion feriante en Francujo. Se vi povus min tranoktigi dum unu aŭ kelkaj noktoj (dum la unuaj semajnoj de aŭgusto) mi estus tre kontenta.

Vian adreson donis al mi mia bonega amiko Bradio Moro, kiu estas mia anglo-instruisto.

Mi bezonos nur lokon por dormi (eble laviĝi) sen manĝo aŭ io simila. Mi povos havi mian dormosakon kaj tendon se necesas. Do, se vi hazarde estos hejme komence de aŭgusto, mi petas al vi dormolokon se tio eblas ; aŭ eble vi havas konatulojn kiuj povus min tranoktigi se vi ne povus ?

Esperante, **Jarek** (Jaroslaw Lawadski)
P.S. Eble du neesperantiĝintaj amikoj vizitos vin (kun aŭ sen mi), ĉu vi povus helpi ilin laŭ via eblo ?

Treviso, 10 Luglio 1995

Kara Christian,

Kiel mi skribis al vi, mi deziras viziti vian komunumon en Balagué (...) Ĉu vi povos gastigi min ? Kompreneble mi pagos por la loĝado (...) Min interesas eĉ partopreni kunvenon ĉe *Multkultura kaj Junulara Centro* (...)

Mi prezentas min : mi estas 37-jara. Mi estas ano de : UEA, Pasporta Servo, Amikeca Reto, Esperantista Grupo *Sile de Treviso* (esperante : Trevizo), Esperanto Radikala Asocio ; kaj ankaŭ : *Servas*, Radikala Partio, Asocio Paco kaj disvolvado (Justa kaj Solidara Komerco), Treviza Filozofia Asocio (pri Gandhi, Tolstoj, M. Bookchin ktp.)

Mi kutime interesiĝas pri telemadiko (mia E-Poŝto : G.Gentile@agora.stm.it), Distribua Ekonomio (*La Grande Relève*), Bioregionismo, Libereca ideologio, Komunuma vivo.

Mi kunportos dormosakon, tendon. Mi ne fumas. Nun mi atendas vian respondon kaj pro tio mi aldonas unu respondkuponon kaj koverton (...)

Dankon. Ĝis ! **Guido Gentile**
(adreso : *Via Pasubio 27, IT-31100 Treviso, Italio*)

La 15-an de aŭgusto 1995

Estimataj,

Mi ĝojas ĉar reprenis kontakton kun *Hejmoj*. Mi ĉiam revas komunumi, mi tre simpatias kun HIK. Mi ŝatus koni adreson de SEL-movado. Tie ĉi mi partoprenas en itala revueto kiu celas kiel SEL.

HIK ĉiam antaŭen ! Mi aliĝos kiel eble plej baldaŭ al HIK.

Korsalutojn, **Jorge Angel Tarducci**
(adreso : *Mazzini 284, IT-Molinella BO, Italio*)

[Romo ?], 29-08-1995

Kara amiko,

mi ricevis la lastan numeron de *Hejmoj* kaj mi dankas vin. Ĝi estas tre riĉa kaj certe instigos aliajn esperantistojn fondi pliajn hejmojn.

Se vi parolas Esperanton hejme vi rajtas esti registritaj inter la familiojn uzantajn Esperanton. Por fari tion, sufiĉas sendi poŝtkarton al UEA-**Rondo Familia**. Ĉiuj registritaj familoj ricevas senpage la « *Cirkulaĵo* »-n.

Bonvolu instigi ankaŭ aliajn familiojn aŭ komunumojn en via rondo fari same.

Mi vidas multajn eblecojn por komunaj agadoj. Ekzemple, ĉu vi ne ŝatus venontan jaron provi gastigi ĉe vi (kontraŭ pago de la restadkosto) kelkajn okcidenteŭropajn familiojn ?

Temus pri aranĝado en la okcidento la unuan fojon, de tio kion oni nomas *Renkontiĝo de Esperantlingvaj Familioj*, kiu ĝis nun okazis nur en Meza Eŭropo.

Ĝis rekonto. Amike, **Renato Corsetti**
(*Ronda Familia* : per adreso de UEA-Centra Oficejo)

La 9-an de oktobro 1995

Kara Christian

Mi bonorde ricevis vian « *Ĝenerala bibliografio pri Tibeto* [en esperanto] », pro kio mi tre dankas vin. Mi ja enmetos tiun ĉi datumaron en nian datumbazon (...) Bonvolu daŭre informi min pri aliaj publikigaĵoj aŭ tradukoj. Antaŭdankon.

Ĝis tre baldaŭ mi esperas. Amike. **Taŝi deleg.**
Erwan Temple (*Dzambala*, BP 3, 24290 St-Léon)

Historiaj esploroj

Bona Espero, 21-9-1995

Kara samidealano,
kun granda intereso ni legis vian bultenon n-ro 6, same kiel la antaŭajn, kaj eĉ tro bone, pro samaj spertoj, povas kompreni viajn problemojn...

En *Bona Espero* ni vivas de pli ol 20 jaroj seninterrompe la belan revon de Esperanto-komunumo kaj mi forte opinias ke vi devus simple veni ĉi tien por kelkaj semajnoj por interŝanĝi spertojn kaj ne fari la samajn erarojn kiel ni en la komenco, ĉar tiel vi perdus malpli da tempo kaj laborus pli celkonscie kaj efike.

Ni plene konsentas kun Roland Schnell, ke «*la idealo de internacia esperantista komunumo ne dronu en ĉiutaga batalo por bazaj vivbezonoj*» kaj en la konata opinio ke «*MI tro multe laboras kaj la aliaj nur parazititas*», kiel jam en la fama komunumo de Tolstoj.

Ekzistas funkciantaj komunumoj ; ni vizitis tiun [neesperantistan!] de Damanhur en norda Italio apud la Parko *Gran Paradizo*, kun 400 membroj, kiuj kunvivas, kunlaboras, kune produktas kaj kune profitas – evidente ĉio kun certa koncepto pri memdisciplino kaj profunde idealisma kaj spiritualisma motivo.

Esence gravas ke la komunumo en si mem ne devas esti la celo, sed la ilo por realigi ion. Ankaŭ gravas ke la komunumo en sia plej vasta najbareco estu socie pozitive akceptata kaj enplektita, ekzemple per ia socia servo al la homoj, kio siavice povus garantii la bazajn vivbezonojn.

La finaj konkludoj de Bruno Vogelmann en «*La Nova Realismo*»* kaj la konsekvenco de la nova pensado estus eble tre bona gvid-linio por kunvivado ĉe vi. La kunloĝantoj devus iel moviĝi en la sama frekvenco – ĉu vi legis lalibron de James Redfield «*The Celestine Prophecy*»? En ĝi vi trovos i.a. tre interesajn konceptojn pri la homaj interrilatoj kaj la konsciiĝo.

Rilate viajn historiajn esplorojn sur p.5 [de n-ro 6] ni aldonas tekston el *Esperanto* 1939** : ...stranga koincido ; en 1957 la fondintoj de *Bona Espero* tute ne sciis pri la afero kaj la nomo estas sama ! Anstataŭ 250 km sude de Brasilia (Catalao) ili ekloĝis 250 km norde de fondota Brasilia. Cetere la fondinto de la revuo de UEA *Esperanto* elmiĝis en ĉ. 1910 al Brazilo, Goiás, kaj fondis Esperanto-komunumon kaj estas enterigita ĉi tie.

Viaj esploroj certe estas tre interesaj ! (...)

Ni atendas vian reagon kaj viziton kaj salutas amike kaj frate, **Ursula** kun 40 komunumanoj

* Antwerpen : FEL, 1989, 185 p, ISBN 90-71205-29-0.

** Bedaŭrinde la fotokopio ne estis en la koverto.

Respondo de la redaktoro

Pri Paul Berthelot, naskiĝinta la 26-7-1881¹ kaj mortinta la 2-11-1910 ĉe la 4-homa dominikana «*Misio de la Senmakula Koncipiteco ĉe la Indianoj arbar-enloĝantaj*»² en Conceição do Araguaya, la plej gravaj esperantlingvaj biografiaj artikoloj estas tiuj de Carlo [tiel!] Bourlet, kaj de Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux. Jen do la nuraj informoj pri tiea (Esperanto?-)komunumo :

« En 1909 (...) mi ricevis de li lastan kortuŝigan leteron. Ĝi estis kvazaŭ adiaŭo al la mondo, al la vivo. Li sciigis al mi ke li foriras kun kelkaj kunuloj en sovaĝan parton de la fundo de Brazilo por tie fondi socialistan kolonion. Li skribis : «*Vi verŝajne ne revidos min, ĉar de tie kien mi iras neniu ankoraŭ revenis !*». Kaj li ne revenis. Kio okazis al li en tiuj vastaj stepoj, aŭ arbaroj aŭ montoj senhomaj ? (...) » (C. Bourlet³)

« En Goiás Berthelot provis starigi diversnacion komunisman komunumon, sed la entrepreno baldaŭ fiaskis. Persekutata de la aŭtoritatoj, perfidita de siaj kunuloj, priŝtelita... » (J. Amouroux⁴)

« Devigita fuĝi en Sud-Amerikon li daŭrigis tie siajn revoluciajn agadojn en Montevideo, Buenos-Ajreso kaj Rio-de-Ĵanejro. Tie li akiris⁵ de *Anarkiista Federacio* la mision organizi en la interno de Brazilo koloniigon laŭ la komunistaj doktrinoj kaj metodoj. Sed mallonge post⁵ lia alveno en Goiás, la kunuloj de la entrepreno forlasis lin, ne sen unue lin perfidi, denunci kaj ...priŝteli. »

Nu P-o Jozefo Audrin, frato el la dominikana *Provinco de Tuluzo*, kiu verkis la lastan raporton, precizigas : « Mia kolego P-o Antono Sala, pli intime en kontakto kun⁵ la juna malsanulo [t.e. Berthelot], estis pli poste uzonta la informojn venintajn de la ĉefurbo [Rio-de-Ĵanejro] kaj profitigonta la longajn interparoladojn kiujn li havis kun li, por verki kelkajn biografiajn notojn, kiuj tiutempe altiris la atenton de certa franca kaj brazila publiko. Mi tie ĉi notas ties esencajn detalojn. »

Ĉu iu bonŝance havas pliajn informojn aŭ alireblecon al la arkivoj de *Anarkiista Federacio* por eventuale restantaj korespondaĵoj pri la temo, aŭ bonvolos esplori en la brazilaj periodaĵoj el 1911 kaj 1912 por retrovi la aluditajn artikolojn ?

1/ Kaj ne en 1882 kiel skribite en *Encikl. de Esperanto*.

2/ *Missio Imm. Conceptionis apud Indios Sylvicolos*.


3/ En *La Revuo* n-ro 8 (56), aprilo 1911, p. 374-377.

4/ En *Esperanto* n-ro 834, junio 1975, p. 103-104.

5/ Laŭ alia versio, respektive : *ricevis, ekde, interesita per*.

REVUJ KRAJ SONĜOJ PRI ESPERANTUJOJ (dua parto)

Propaganda Ligo
Parkurbo
Esperanto
GRAFELFING-
- MÜNCHEN -
(Germanujo)
8 Pfandhausstrasse 8.
Bababentoli:
:: Cabanne Esperantiste ::
Bayer. Vertriebsbank München.
Parkurbo Esperanto apud München. - La sentriista Kastelo.



Karaj gelratoj,
anlaŭen sen timoj!
Gardu kuragom
en via animoj!
Nia smeralda
standardo kun stelo
Nin alkondukos
sendube al celoj!


"Parkurbo Esperanto"

"Alia plano geremis en la kapo de homoj, kies espero je monprofito certe superis ilian idealisman flankon: La 8-an de junio 1912 sub la impulso de la Dresden-a komercisto Leopold Schlaf, fondigis la Propaganda Ligo "PARKURBO ESPERANTO" sub la adreso: München, Pfandhausstr. 8. Ties celo estis, krei esperantistan urbon, helpe de munkena bankisto, laŭdire favoranta Esperanton. La ligo akiris en la vilaĝo Grafelfing terenon de miliono da kvadrataj metroj.

La ligo havis estraron, kies plej aktiva ano estis s-ro Schlaf. Tiu jam eldonis lernolibron, vortaron kaj E-bildkartojn. Li eĉ fondis en Germanujo "Laboristan E-ligon".

Por financi la entreprenon, la ligo organizis loterion, kiu konsistis el miliono da biletoj de po 1.-- marko. La germana leĝo permesis loterion nur inter membroj de sama societo kaj tial necesis deviga aliĝo, cetere senpaga. La E-gazetaro siatempne ne multe bruis pri tiu entrepreno, sed rimarkebla estis vekita sciivolemo de la tutmondaj Esperantistoj. Sed baldaŭ levigis demandoj pri la seriozeco kaj efikeco por Esperanto de la tuta afero. En decembro 1913 la ruso Obručev tiele finskribis raporton pri vojaĝo tra Germanujo: "...Sinjoroj, fondu parkurbojn, nomu ilin "Esperanto", organizu eĉ loteriojn, sed ne postulu aliĝon je la nomo de "nia sankta afero", ne parolu pri la "estonta ĉefurbo de nia karega Esperantujo, ne malklarigu nian simplan celon per nebula revado...". En junio 1914 la ruso Devjatnin, ekssekretario de tiu ligo, atentigis: "...Ni avertas, ke oni ne sendu monon al la projektita parkurbo... la afero ne estas fidinda..." "


Jen, do, mallongigita artikolo el "Kulturaj Kajeroj" el la plumo de nia Amouroux. Jam delonge min interesis tiu mistera "Parkurbo Esperanto". Ja mi renkontis iujn spurojn pri ĝi: glumarkojn, varfoliojn k.a. Antaŭ jaroj la filatelista ĉefo de mia urbo donacis al mi eĉ originale senditan parkurban koverton, en kiu estis sendita "membrokarto". Dankon al nia Amouroux pro la transdonitaj informoj!



Fotokopio el *La Verda Lupeo*, junio 1992, organo de « ELF-AREK » (*Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj*), afable sendita de la E-movada historiisto s-ro Amouroux, Perpignan (F)

Propaganda Ligo -
"Parkurbo Esperanto"
München, Pfandhausstrasse 8. Telefon 30623
Druchsache
Jen
Herrn. Nobiles
Boatoto
Mitgliedskarte
Legt bei
Bayerische Post. III


La koverto de la "Parkurbo Esperanto" kun la stampindiko: membrokarto enmetita.



"E S P E R A N T O K O L O N I O en Germanujo

Inter multaj esperantaĵoj, kiujn mi lastatempe ricevis, ankaŭ troviĝis la dekstra koverto. Temas pri libertempa hejmo por Esperantistoj en Driedorf, kelkaj km norde de Limburg.

RO 102 mm
EKO-AKTION
Friedrichshagen, 19. September 1947
EKO-Zentrale, E. Kasper
(14) Dresden/Dresden, G. Meyer
Deutscher Poststempel
50
50
Richard Hirsch
(208) Hettstedt
78



Ĝis nun mankas detalaĵaj informoj. La stampo estas el la jaro 1947. Kiu el la ELF-AREK'anoj eble scias detalojn pri tiu objekto? Bv., se vi ion scias, skribu al: Richard Hirsch, adreso vd. sur la paĝo 16.

Tiu dokumento denove pravas, ke, se oni severe kaj serioze serĉas, oni ĉiam povas trovi ion, kion pliricigas la historion de Esperanto.

Pri la biblioteko

Gray, 26.12.1994

Estimata Samideano,

Kun surprizo mi ricevis kaj legis viajn senditajn dokumentojn pri « *Bibliothèque d'Espéranto du Couserans* ».

Fakte, via propra kreado ne temas nur pri « *bibliothèque* », sed pri ĉiaj kolektaĵoj, sendube por atingi kio ekzistas en Gray.

Certe la propagando de nia lingvo kaj la disponigo al vasta (?) publiko de esperantaĵoj ne estas nepra monopolo ! Tamen, en tiu ĉi kazo, mi tute malaprobis vian neoportunan iniciativon.

Vi ja scias ke la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray, jam fame konata tutmonde, kreiĝis je la nepra kondiĉo de la sinsekvaj urbestroj kaj aprobo de granda nombro da francaj Asocioj, ke ĝi fariĝos kvazaŭ Centro kie devus kolektiĝi kiel eble plej impona materialo de nia kultura Esperanto-heredaĵo.

La celoj estis ke studantoj, verkistoj, ĉiuj serĉuloj pri nia movado ne demandu pli kaj pli nombrajn « muzeojn » kaj veturu de loko al loko, en ĉiu angulo de Francio por eventuale trovi la deziratan dokumenton. Do laŭ mia opinio, estas tute malutile multobligi tiajn dokumenteojn (...)

Estimata Samideano, bonvolu kredi ke mi ne argumentas ĵaluzeme, sed nur konsiderante la duban profiton kiun ricevos nia movado pri tio, movado sufiĉe malsana, dividita, egoista kaj misaŭdis-aganta.

Kun miaj samideanaj sentoj, via

Géo Junier

Tokio, 1994 12 30

Estimataj,

Gratulon al la ambicia projekto eksplikita en via cirkulero de decembro 1994. Ĉar nia instituto estas malriĉa ni povas donaci nenion al vi, ne budĝetitan. Anstataŭe, mi private sendos al vi mian libron (...)

Sincere via

YAMASAKI Seikô,

Internacia fako, Japana Esperanto-Instituto.

Aalen, je la 5-a de Jan-o 1995

Estimataj gekolegoj !

Ni gratulas al vi pri la celo starigi novan Esperanto-bibliotekon en suda Francujo kaj deziras al vi la plej eblajn fortojn majstri ankaŭ en la estonteco vian projekton (...)

Kun kolegaj kaj samideanaj salutoj,

[Heinz Schaeffer],

aferviganto de Germana E-Biblioteko

(Kiel respondoj al la ĉi-apuda)

Balagué, la 6-an de februaro 1995

[al S-ro Duc Goninaz]

(...) Mi aldonas ĉi-kune ankaŭ fotokopion de respondo (...) kiu iomete ĉagrenas min ĉar oni atribuas al mi metodojn kaj intencojn kiuj tute ne estas miaj ! Kion vi opinias pri tio ĉi : ĉu fakte estas prefereble, ĉion centralizi en Gray, aŭ ankoraŭ, ekzemple, tien sisteme transsendi ĉion kion la [franca Nacia Esperanto-]Muzeo ne posedas, kaj ĉi tie konservi nur la reston (sed mi konfesas ke tio estus por mi malfacila ofero kvankam tio koncernas verŝajne malpli ol unu procento el la tuto) ? Mi tute ne pensis provi konkurenci kun li, kaj ekzistas probable jam almenaŭ dekduo da bibliotekoj en Francio, kiuj estas pli gravaj ol la nia sen ke, laŭ mia scio, li trovis ion por kontraŭdiri pri ilia ekzisto.

Sed tio ankoraŭ estas nura projekto, kiu cetere estas ero de multe pli vasta projekto pri internacia esperantista komunumo (...); se tia projekto de modesta biblioteko, ne pli ol departementa aŭ regiona (aŭ pli faka, ekzemple pri religioj) montriĝus vere malutila aŭ ŝajnus tia al plimulto da kompetentuloj eventuale trovotaj kaj konsultotaj, tiu ĉi projekto povus tutsimple esti forlasata, aŭ almenaŭ plibonigata por respondi al pravaj kritikoj. Estas tiom da eblaj manieroj helpi al la antaŭeniĝo de esperanto ! (...)

Christian Lavarenne

Aix-en-Provence, la 13-5-1995

Kara amiko,

(...) Kaj pri la projekto de « *bibliothèque du Couserans* », mi ne vidas kial G. Junier vidas en ĝi projekton konkurencan kun tiu de Gray : ne temas pri la sama regiono. Aŭ oni do devus diri ke la Muzeo en Gray estas senutila konkurencaĵo de la Biblioteko en La-Chaux-de-Fonds, geografie multe pli proksima. Sed mi trovas en lia letero la nocion kaj la vorton « *Francio* », kiu klarigas lian reagon. Strange por esperantisto, pensi laŭ kategorioj de Ŝtatoj. Sed kiam oni atentigas ke li nomis la muzeon de Gray « *Nacia* », oni pli bone komprenas. (...) Do, ne hezitu : diru ke via biblioteko ne estas « *du Couserans* », sed de Okcitanio !

(...) Elkore,

M. Duc Goninaz*

(* Tradukita de la redaktoro el la franca. Li estas i.a. respondeca pri la biblioteko de la Universitata Esperanto-fako, kiu cetere **riskas malaperi** venontjare.)

Biblioteko

Grava peto al bibliotekistoj kaj esploristoj

Bonvolu helpi nin kompletigi kaj ĝisdatigi nian 10-paĝan « *Bibliographie générale du Tibet en espéranto / Ĝenerala esperantlingva bibliografio pri Tibeto* ». S-ro Erwan Temple, kompilinto de la 288-paĝa unua volumo de scienca bibliografio de ĉiuj libroj kaj artikoloj pri Tibeto verkitaj en eŭropaj lingvoj (vol. I : *Bouddhisme*, eld. de *Tibet Diffusion* en Saintes (F), 1991, ISBN 2 903931 02 X), petis min indiki al li kio estas publikigita en esperanto. (Vidu lian respondon al mia unua sendaĵo, sur p. 3). Sed mi bone konscias ke, kvankam jam 10-paĝa, ĝi restas ankoraŭ tute ne kompleta. Ununura ekzemplo sufiĉos por ilustriti tion : por *El Popola Ĉinio* mi povis registri la artikolojn nur el la numeroj ĉeestantaj en nia biblioteko.

Se vi akceptas partopreni en la kunlaboro, petu la unuan liston : ni ĝin sendos senpage al vi.

La biblioteko nun entenas (minimуме!) ekzemplerojn el 200 diversaj esperantlingvaj periodaĵoj, el 145 diversaj neesperantistaj gazetoj kiuj ion aperigis pri esperanto, kaj el 12 diversaj gazetoj en aŭ pri aliaj planlingvoj. La plej gravaj donacoj nun estas tiuj (laŭ peze malkreska vicordo) de Jacqueline Lépeix, François De-goul, Jane Laurent, Christian Baudé (Kribo, red. de *Laŭte*). Dankon al ĉiuj donacintoj, kaj donacoj.

Por konsulti, fotokopiigi aŭ pruntepreni, bonvolu antaŭe interkonsenti kun : **Christian Lavarenne, Esperanto-Biblioteko, "Le Presbytère", F-09800 Balagué (Francio). Tel. (+33) 61 04 70 66 .**

Jen la dua triono de la ĝisdatigita listo de periodaĵoj, kiun ni esperas iom post iom **kompletigi dank'al viaj sendoj** de iuj ajn malnovaj revuoj, gazetoj, bultenoj, broŝuroj, libroj, flugfolioj... ; kaj ankaŭ eltiraĵoj de neesperantistaj gazetoj pri esperanto - aŭ internacia lingva problemaro - en iu ajn lingvo ; kaj eĉ (interesaj!) asociaj aŭ privataj leteroj, ĉar ni povas ankaŭ starigi arkivon ; glumarkoj, insignoj, flagoj por la muzeo, ktp... **Broŝuraj, libraj aŭ monaj kontribuajoj estas do tute bonvenaj ! Neniam ion forĵetu : sendu ĝin al la ĉi-supra adreso !**

Dankon !

Periodaĵoj

ĉe la "Bibliothèque d'Espéranto du Couserans"

(sekvo)

Mallongigoj : fk = fotokopio, nk = nekompleta, p = paĝo, trim.= trimonata, * = neesperantista sed pri esperanto, ** = en aŭ pri alia(j) planlingvo(j), (+, x2:) = listo de interŝanĝeblaj duoblaĵoj. La priskriba sinsekvo de la periodaĵoj estas jena : Titolo: eventuala subtitolo (periodeco, [lasta!] Eld., Urbo, mallongiga kodo de lando), numeroj (dato [de la unua kaj lasta]) aŭ [kompletaj] jaroj.

- Se estas cifero indikanta jaron, ekzemple : 1989, tio signifas ke ĉiuj numeroj de tiu jaro ĉeestas (krom se ĝi estas sekvata de : KROM/SAUF plus cifero de mankanta(j) numero(j)).

- Se la jara cifero estas tuj sekvata – post / – de alia cifero, ekzemple 1987/2, tio signifas ke temas pri la 2-a n-ro de la jaro 1987. Sed se la jara cifero tuj sekvas ciferon plus -, ekzemple 4-1991, tio signifas ke la n-ro aperis je tiu dato (ĉi-ekzemple, en aprilo 1991).

- Se nk aŭ fk estas post numero, tio koncernas nur tiun ĉi ; se antaŭ la unua, tio koncernas ĉiujn.

Internacia Registro de la Mondcivitanoj (duonjara/semestriela ?, Esperantista Internacia Centro, 77-Dammarie-les-lys, F), 32 35 36/37 (aŭtuno 1993)

Internaj informoj (monata/mensuel, Dana Esperanto-Asocio, DK), 40 (9-1989) nk fk

"Inter ni" : L'espéranto en marche (trim. , Association pour l'espéranto, Liège-Espéranto et Charle-

roi K.G.E., Embourg, B), 1993-94/3 (4/6-1994)
1993-94/4 1994-95/1 (10/12-1994)

IREJO-Bulteno (dumonata/bimestriela, Irana Esperantista Junulara Organizo, Tehran, IR), 11 (10/11-1995)

*J'aime Laroque d'Olmes : infos municipales (monata/mensuel ?, La Roque, F), 11-1990 nk fk

- Jarlibro (Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, NL), 1982 1986-1988 1992-1995
- J.E.F.O. informas (dumonata/bimestriel ?, Organisation de la Jeunesse Espérantiste Française, Paris, F), 1991/1 (1/2-1991) 1991/6 (11/ 12-1991) 1992/1-1992/6 (11/12-1992) (+ , x 2 : 1992/2 1992/3) (sekvo : "JeunEsperanto Info")
- JEBULO : Jerusalema Bulteno (Jeremi Gishron, Jérusalem), 12 (5753 /1993) 14 15 16 (Novjaro 5756/Aŭtuno 1995)
- JeunEsperanto Info : Magazine de l'association JEFO (dumonata/bimestriel, Junulara Esperantista Franca Organizo, Paris, F), 1 (1/2-1993) 2-6 1994 /1 (1/2-1994) (+, x2 : 2 4-6) (sekvo de "J.E.F.O. informas")
- *Journal de la Paix (F), 412 (11-93) p.35 nk fk
- *Journal Officiel des Questions Ecrites (Assemblée Nationale, F), 45 (26-12-1988) nk fk
- Juna Amiko (trim., Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Budapest, H), 62 (1992 /3)
- Ĵurnalo de LBV (dumonata/bimestriel, Legio de Bona Volo, Sao Paulo, BR), 6 (1-1988) 11-13 (3/4-1989)
- *Jydske Haderslev (DK), 6-7-1989 nk fk
- KAE-Infomilo (trim., Kataluna Asocio Esperantista, Sabadell/terrassa, E), VII/3 (somero/été 1993)
- Kara Amiko (dumonata / bimestriel, Kastora Klubo, Varsovio, PL), 46 (9/10-1993)
- Katalogo (dujara ?, (Libroservode) UEA, Roterdamo, NL), 1984/85
- Katalogo de novaj eldonajoj : Suplemento al la Katalogo 1988/89 (UEA, Roterdamo, NL), 1990
- Kataluna Esperantisto (trim., Kataluna Esperanto-Asocio, Sabadell, E), 267 (4-1990) 268 280 282/283 290 291/ 292 293 (7-1995)
- Katolika Mondo : Universala Organo por tutmondaj interesoj katolikaj, Oficiala internacia organo de "Internacio katolika" (Ika), "Mondjunularo Katolika" (Moka), "Internacia katolika Esperanto-Oficejo" (IKEO), kaj "Blanka kruco" (Internacia misio katolika), (Paŭlus-eldonejo, Graz, A), II,2 1922/23
- KCE-Ĝenerala programo (jara/annuel, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, CH), 1993 1994 (+, x2 : 1993)
- K.E.C.-Bulteno (Centro Esperantista Cattolico, Milan, I), 221 (10-1994) 223 224 226 227 229-233 (10/1995)
- Koncize (dumonata/bimestriel, Esperantistaj junularaj asocioj en D, NL, F, Flandrio, DK, I, A, CH, H, Bonn, D), 56 (11/12-1984) - 68 (67 : mankas p11 12) 72 75 76 79 80 91 96-98 100-109 113 (9/10-1994) (+, x2 : 106-109)
- Kongresa Kuriero (ĉiutaga/quotidien, 72-a Kongreso de Esperanto, Varsovie, PL), Informilo (25-7-1987) 1 (26-7-1987) 5 7 (1-8-1987)
- Kongresa Kuriero (ĉiutaga/quotidien, 76-a UK, Bergen, N) 1 (28-7-1991)
- Kongresa Libro (jara/annuel, UEA, Rotterdam, NL), 1969 1987 1989
- Konkordo (trim. ?, Internacia Societo de invalidaj esperantistoj «Konkordo», Ventspils, Lettonie), Suplemento 9-1990 22 (1/3-1992)
- Konsilaroj por aktivuloj (UEA, Rotterdam, NL), 1 (5-1991) nk fk
- Kontakto (dumonata/bimestriel ?, G. Maertens, Brugge, B), 76 94 95 97-100 106 112 117 124-127 133 (1993/1) p12 nk fk
- Korespondi (R. Melo, 03700 Bellerive F), 44-a listo (9-1994) (en Debrecena B. 85)
- Kosmo(s): La Kosmologio de Martinus (trim., Martinus Instituto, Copenhagen, DK), 1-4 (1969) 1995/1 - 1995/4
- *Kosmos : Organ for Martinus Andsvideuskab (trim.?), 21/1 (1-1953) p.7-11 fk
- *Kosmos : Martinus Cosmology (dumonata/ bimestriel, Martinus Institute, Copenhagen, DK), 1993/3 1994/3-6 1995/1 1995/2 1995/3 1995/5
- Kristana Alvoko (Fellowship of British Christian Esperantists, Oxford, GB), 114 (9-1989) 117-119 121 122 124 125 129-132 (9-1995)
- Kristliga Esperantoförbundets Medlemsblad (monata/mensuel ?, Svensk sektion av Kristana Esperantista Ligo Internacia, S), 226/227 (11/ 12-1989)
- Kroata Esperantisto (dumonata/bimestriel, Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, HR), 42 (5-7-1993)
- Kulturaj Kajeroj (trim., Maison Culturelle Espérantiste, Baugé, F), 1973/3 (5/6-1973) 1973/5 1974/1 1975/6 1976/2 1976/5 1977/1 1977/2 1978/3-4 1978/6 1979/1-5 1980/1 1980/6 1981/1 1981/5 1981/6 1982 1984-1988 1995/2 (4/6-1995) (+, x2 : 1982/2)
- Kune (trim.?, "Tutmonde", Pacifista Movado, Terrassa, E), 3 (11/12-1990) 8 - 12 (1/2-1994)
- KUSPE : Oficiala informilo de Eŭska Esperanto-Asocio (trim.?, Euskalerriko Esperanto Al-kartearen, Vitoria-Gasteiz, E), 11 12 (aŭtuno 1995) (+, x2 : 11 12)
- Kvakera Esperantisto (duonjara/biannuel ?, Kvakera Esperantista Societo, Brain Tree, GB), 88 (printempo 1976) 94-101 104-106 108-118 121 124 130 131-134 (7-1994) (+, x2 : 97 131-133)
- Kvieta Mateno : kongresa kuriero (ĉiutaga/quotidien, 79a Universala Kongreso de Espéranto, Séoul, Corée), 1 (23-7-1994) - 6 (29-7-1994)
- **La Blanka Stelo : Revuo en la Linguo Internaciona di la Delegitaro (Ido = Esperanto reformita) (trim., Ed. Waterkotte, Colmar, F), 1-2 (1961)

- (14p) 3-4 (1961) (12p)
- *La Croix du Midi : actualités de la Haute-Garonne et de l'Ariège (semajna/hebdomadaire ?, 31-Toulouse, F), 29/31 (6-8-1993) nk fk
- *La Croix l'Evènement (ĉiutaga/quotidien) 1987 ou 1988 nk fk (en La Informilo 61)
- *La Dépêche du dimanche : Ariège (semajna/ hebdomadaire, F), nk fk 16423 (12-9-1993) 16688 (5-6-1994) p.21 19-3-1995
- *La Dépêche du Midi (ĉiutaga/quotidien, Toulouse, F), nk fk 19-2-1987 (:Lundi/sports) 6-4-1987 (:Toulouse) 14086 (6-4-1987) 7-4-1987 24-6-1990 (: Ariège) 17-1-1991 25-5-1993 p.18 4-3-1994 (: Ariège) 24-4-1994 7-5-1994 p.24 16677 (25-5-1994) (: Ariège) 11-6-1994 (: Ariège) 2-7-1994 23-7-1994 27-7-1994 22-5-95 24-6-95 21-10-95 p.21
- La dua jarcento : interkultura revuo (trim., Internacia Esperanto-Muzeo, Esperanta Societo '95, Pro Esperanto, Wien, A), I,1 (1995) (+, x2 : I,1)
- La Espero el Koreio (dumonata/bimestriel, HAN Moo-hyup, Seulo, Corée du Sud), 52 (1/2-1983) 85 95 (3/4-1990)
- La Gazeto (sessemajna/6 semaines, Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, Metz, F), 8 (31-1-1987) 9-27 29-50 58 (30-4-1995) (+, x2 : 10 15-19 31-34 36-37 39-44 46-48)
- *La Gazette (ĉiutaga/quotidien ?, F), 16-10-1985 nk fk
- **La Grande Relève (semajna/hebdomadaire, Mouvement Français pour l'Abondance, Paris, F), (s.d.:1959? nk) 20-10-1959 nk
- La Informilo (trim., Kultura Esperanto-Federacio de Orienta Francio/Espéranto France Est, Nancy, F), 57 (1987/1) 58-61 63-64 73-84 (+, x2 : 57)
- La Japana Budhano (dumonata/bimestriel, Japana Budhana Ligo Esperantista, Saitama-ken, J), 229 (7/8-1988) 230-255 257-258 260 270 272-276 (1995) (+, x2 : 240 250)
- La Juna Penso (dumonata/bimestriel, SAT-Junulfako, Beauville, F), 44 (9/10-1965) 46-54 59-61 63-83 86 87 97 115-135 (6/10-1981)
- La Kancerkliniko : politika, kultura, ajnista, skandalema (trim., Jacques Le Puil, 18210-Thaumiers, F), 32 (10/12-1984) 34-51 55-67 69-75 (4/6-1995) (+, x2 : 41 50 57-61 63 64 73 75)
- La Kortega Cirkulero (ĉiutaga/quotidien, 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brighton, GB), 1 (30-7-1989) - 3 5 (4-8-1989)
- La Krokodil' (dumonata/bimestriel ?, Esperanto-Kultur-Centro, Toulouse, F), 1 (19-9-1993) nk fk 2 6 (2-10-1994) ("1996"!)) 11 (9/10-1995)
- La Kromkancerkliniko (jara/annuel, Jacques Le Puil, 18210-Thaumiers, F), 2 (1984) 3-6 8 9 (1991) 1994 (+, x2 : 9)
- La Kunaganto : Aktivula bulteno de Monda Kunagado (Monda Kunagado, Otavo, CDN), 2 (10-1992)
- **La Langue Internationale (trim., Société Idiste Française, 31-Fourquevaux, F), Série C, 10 (4/6-1962) (8p)
- La Lanterno Azia ((dumonata/bimestriel, Korea Esperanto-Asocio, Corée), 115 (?) (7/8-1994)
- La letero de l'Akademio de Esperanto (trim., La Amikoj de l'Akademio de Esperanto, Paris, F), 3 (4/6-1988) 14 15 22 27 (4/6-1994)
- La Lettre de l'Espéranto (monata/mensuel ?, UFE, Paris, F), 381/10 (1987) nk fk (en La Informilo 60) 403/1 (11-1989) nk fk 466 (9-1995) nk fk (en E-Pyrénées 69)
- La Libera Esperantisto (trim., Libera Esperanto-Asocio, Düsseldorf, D), 27 (4/6-1991) 32 34 (10/12-1992)
- *L'Alsace (ĉiutaga/quotidien), nk fk 1987 (en La Informilo 57) 9-10-1991 (en La Informilo 76)
- La Lumilo (Aŭstralio), 3,7 (16-1-1995)
- La Lumturo de Esperanto : VIDU/VOIR Le Phare de l'Espéranto.
- *La Marseillaise du Berry (ĉiutaga/quotidien ?), 29-6-1994 nk fk
- *La Meuse (ĉiutaga/quotidien, B ?), 18-1-1994 nk fk 14-10-1994 nk fk
- La Migranto (trim., Turista Asocio "La Naturamikoj" Esperanto-Fako, Leusden, NL), 134 (3-1993) 136-138 (3-1994)
- *La Montagne : Centre France (ĉiutaga/quotidien ?), 9-8-1994 nk fk
- *Langues Magazine (trim.?, Paris, F), 27 (7/9-1990) nk fk
- *La Nouvelle Gazette (ĉiutaga/quotidien ?, B ?), 29-6-1994 nk fk
- *La Nouvelle République du Centre-Ouest (ĉiutaga/quotidien), 5-5-87 nk
